

KKPS estis denove granda sukceso

Bedaŭre ĉiuj, kiuj ne ĉeestis, ĉar la dua KKPS denove estis granda sukceso. 55 homoj el ĉirkaŭ dek landoj alvenis al la bieno en Werkhoven, kelkaj post mensriĉiga ekskurso en Amsterdamo. La gastoj estis bonvenigitaj per varma nederlanda specialaĵo: boerenkoolstampot (vidu foton).



Boerenkoolstampot

Poste okazis halovina festo, kiu specife al unu franca partoprenantino donis fortajn kortremojn. Kaj la vespero finiĝis per homlupa ludo gvidata de Michael Boris "La Voĉo" Mandirola. Dum la sabato okazis diversaj prelegoj kaj metiejoj kaj promena ekskurso laŭ la Rejno al kastelo. Krome estis bunta oferto da tabloludoj kaj plejparto el la ĉeestantoj estis murditaj (en la vort-murdludo kaj la faks-murdludo, feliĉe). Vespere estis etosa akustika koncerto de ĴeLe kaj nokte sekvis fifamaj trinkludoj.

Antaŭ adiaŭi la partoprenantojn okazis ankoraŭ dimanĉa urba ludo en Utrecht. Ĝin certe rememoros ĉiuj pro la surpriza hajlo dum la ludo. Ni dankas al ĉiuj partoprenantoj kaj esperas revidi ilin ĉiujn en 2014!

Ne maltrafu la sekvan KKPS-on!

Post unu KKPS en fortikejo kaj dua en bieno, la tria KKPS okazos ĉe la maro, en la taŭge nomata Kvartalo-ĉe-Mar. Spertu nekredeblan lukson en dupersonaj ĉambroj, aŭ spertu nekredeblan rabaton en tendo. Por pliaj informoj kaj por aliĝi, vizitu <http://kkps-klacxkunveno.wikispaces.com>!



Persona nomo: _____

Familia nomo: _____

Naskiĝdato: ___-___-_____ Sekso: _____

Retpoŝtadreso: _____

Loĝlando: _____

Manĝo: ĉionmanĝanto / vegetarano / _____

Dormo: En tendo/en duopa ĉambro (kun: _____)

Mi antaŭpagas €20: Per bankĝiro/per uca-konto/kontante al : _____



Pos-Amiko

Vintro 2013, Numero 7

INDEKSO:

1. Skandalo en la AIS

1. Neregulaĵoj dum elekto de IJK 2015

2. TEJO lanĉas novan fonduson

2. Brazila cenzuro malebligas objektivan informadon pri IJK

2. Vojaĝantoj en mezo de nenio pro veterkondiĉoj

3. IEJ fajfas pri genra egaleco

3. El la tombo de Zombenhof

3. Horoskopoj

4. EVENTOJ

Skandalo en la Akademio Internacia de la Sciencoj

D-ro B. Telo senmaskigita: liaj esploroj ne havas sciencan valoron.

Luj el vi certe rimarkis, ke en la pasinta eldono de la PosAmiko mankis la jam tradicia scienca kontribuo de nia estimata (almenaŭ ĝis nun) d-ro B. Telo, el la Akademia de la Sciencoj de San Marino. Efektive la redakcio de Pos-Amiko decidis interrompi la kunlaboron post la apero de gravaj akuzoj, kiuj ĵetas ombbron sur lian elstaran kaj brilan karieron.

Prof. S. Breco, el la komisiono pri Scienca kaj Faka Agado, direktas la fingron al la esploroj de la kolego pri la ligo inter ebrieco kaj la plej kutimaj trinkaĵoj troveblaj en E-aranĝoj. "B. Telo estas ĉarlata-no!" - diris S. Breco - "Liaj esploroj ne havas sciencan valoron, ĉar ili estas faritaj sen kontrolgrupo, kaj - plej grave - la rezultoj estas certe senvalorigitaj de la fakto, ke la esploristo mem partoprenis la eksperimentojn!"

Atendante novajn sciencajn konfirmojn, ĉiuj Esperantistoj tostu senzorge kaj fake al la nova jaro, per siaj plej ŝatataj trinkaĵoj, ĉar ja estas neniu pruvo pri ligo kun ebrieco!

Neregulaĵoj dum elekto de IJK 2015

Laŭ fidindaj fontoj la loko de la IJK 2015, do tiu post Brazilo, estos baldaŭ anoncita. Tamen jam atingas la redakcion de la Pos-Amiko aludoj, ke la ĉi-jara konkurso ne estis tute justa: unu el lokaj teamoj ricevis helpon de dungito de TEJO por kompletigi sian kandidatigon, kaj temas ĝuste pri la elektita teamo! La TEJO-estraro ankoraŭ ne reagis al niaj petoj por informoj, sed starigos dum JES budon, kie interesigantoj povas ekscii pli pri la afero.

TEJO (Trajnŝatanta Esperanta Junulara Organizo) lanĉas novan fonduson

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis en la retpaĝo de TEJO (kiu hazarde tiam funkciis) anonco pri nova fonduso. Sub la nomo Tram-polino, la projekto celas instigi junajn esperantistojn en Polujo pli uzi publikan transporton. TEJO-prezidanto kaj Varsoviano Ł. Ż. respondas en intervjuo:

Ł: „Kiel organizo de trajnŝatantoj ni ĉiam volas instigi homojn uzi la publikajn transportilojn, prefere tiujn sur reloj.”

P: „Sed kial nur Polinoj?”

Ł: „Ni celas virinojn, ĉar viraj trajnŝatantoj jam abundas en nia movado. Kaj kompreneble polajn, ĉar laŭ mi ankoraŭ ne estas sufiĉaj poloj en la organizo.”

La alia estrarano, P. F-K, ne estis atingebla por komentoj. Por facile montri, kiuj homoj jam kontribuis al la fonduso (kaj kiuj ne!), la



La fonduso estas ankaŭ varbata sur busoj en Varsovio.

kontribuintoj ricevas buntkoloran t-ĉemizon por vesti dum ajna okazo en la tuta jaro.

Vojaĝantoj troviĝas en mezo de nenio pro nekutimaj veterkondiĉoj

Pro la ekstremaj kondiĉoj en decembro kaŭzitaj de klimatsanĝo, centoj da Esperantistoj alvenis al eta vilaĝo en la mezo de nenio. La manko de la kutimaj neĝo kaj ŝtormo kaŭzis ilian ĝustatempan alvenon al la kongresejo, kie ili devas tranokti amase surplanke.

Brazila cenzuro malebligas objektivan informadon pri IJK

En la fino de oktobro anonciĝis la nova redaktoro de la revuo Esperanto (por kiu mi cetere ankaŭ kandidatiĝis, kaj certe estis pli bona kandidato). Kun tiu elekto nun la tri plej gravaj revuoj de la Esperanto-movado havas brazilajn redaktorojn: *Esperanto* kun Fabricio Valle, *Kontakto* kun Rogener Pavinski, kaj *Pos-Amiko* kun mi mem, Koko Poso. Rezulte de tio, legantoj ekster Brazilo neniam ekscios malbonajn novaĵojn pri la nun preparata brazila IJK, nek pri la UK, pri kiu respondecas kongresa sekretario Clay Magalhães el Brazilo.

Ekzemple estus interese scii, ĉu unu el la ĉeforganizantoj forlasis la organizan teamon pro disiĝo kun sia amatino, kiu ankaŭ membras en la teamo, sed tion vi bedaŭre ne aŭdos. Nek ĉu virinoj estos baritaj el la amasloĝejo pro konservemuloj en la teamo. Malklare estas ankoraŭ, ĉu tio ĉi estas la rezulto de Brazila konspiro. Pos-Amiko tenos vin (mis)informita pri la afero.

IEJ fajfas pri genra egaleco

Dum la ĉi-jara IJF en Castelsardo, Sardujo, okazos TEJO-trejnseminario pri Genro kaj Egaleco. Ŝajnas tamen, ke plej urĝe bezonas tian trejnadon la IJF-organizantoj mem! La IEJ-estraro enhavas 86% virojn, kaj en la varbfilmeto de IEJ la sola ina estrarano dum monatoj estis ellasita. Krome IEJ havas la faman IJFonduson, kies neoficiala celo ĉiam estas venigi belajn virinojn al la renkontiĝo, kaj nun aldoniĝis dua fonduso: Eŭtopio. Kaj fine atestantoj raportas, ke IEJ-estraranoj frekvente aŭdigas kantojn kun maldeca kaj seksisma enhavo. Ĉu unu trejnseminario sufiĉus por instrui tiun ĉi viran vestejon pri genro kaj egaleco?

El la tombo de Zombenhof

Antaŭ du monatoj en tiu ĉi loko mi anoncis la konkurson por alternativa Zamenhoftago, kaj nun mi kun ĝojo povas malkovri al vi la gajnintojn.

Venis multaj rakontoj pri junuloj, kiuj iris al trinkejo aŭ klubejo por festi. Sed unu rakonto, kiu tre kortuŝis min kaj montras la neceson de alternativoj, estas la jena:

Mi estas novulo, kaj cxi jare estis mia unua Zamenhoftago. Mi do iris al la oficiala festo en la loka klubo sed post 5 minutoj mi komprenis ke mi devas forkuri. Tamen, la organizantoj atendis tion kaj estis pretaj, ili estis gardantaj la pordon de ene! Mi finfine sukcesis forkuri tra la fenestro.

Venkanto estas tamen tiu ĉi, kiu elpensis manieron por fari la tradiciajn festojn pli elteneblaj:

Ni elpensis drinkoludon, kiun ni cxiujare praktikas dum la solena vespero: ni kunportas plastajn botelojn da vodko, kaj cxiam, kiam la prelegisto diras "nia kara lingvo", "paco", "majstro" aŭ forgesas akuzativon, ni devas preni gluton.

Gratulon al Paulínka K, kiu baldaŭ ricevos la ĉefpremion (plasta botelo kaj eterna honoro) hejme.

-Lazaro Zombenhof

La horoskopo

Ŝafo: Vi spertos antaŭĝojon por la festivalo de antaŭĝojo.

Taŭro: TEJO ne plu protektas vin.

Ĝemeloj: Vi malkovros, ke harsekigiloj pli bruas ol ukuleloj.

Kankro: Vi kisos ĉarman fremdulon, dum la novjara nokto.

Leono: Vi eksciis, kio estas plarno, kaj tuj forgesos.

Virgulino: Post la senpaga ŝampano vi ne plu estos.

Pesilo: Vi estas tro okupita pri dancado kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Atentu ne ricevi trajnan superdozon pro la karavano.

Aleks Kadar: Vi volas razi vian kapon, sed jam ne necesas.

Sagitario: Januaro estos bona monato por aliĝi al KKPS.

Kaprikorno: Ne festu la novjaron ĉiujn 39 fojojn per alkoholo.

Akvisto: Manĝobatalo ne estas taŭga anstataŭo por neĝbatalo.

Fiŝoj: Subteraj koridoroj estas bona loko por perdi glueman stalkanton.